

Karaj KER-ekzamenoj

Fulmintervjuo kun Katalin Kováts, respondeculo de la UEA-ITK-ekzamenoj

IPR: *Belan KER-an jaron al vi. Ni ĵus eksciis, ke unu el la meritoj, pro kiuj oni elektis vin la 'Esperantisto de la jaro 2010', estas via laboro por la enkonduko kaj organizado de la KER-ekzamenoj. Kiel vi povas resumi la unuajn du jarojn?*

KK: Ni multe kaj persiste laboris kaj laboras por disvastigi la informojn kaj klarigi pri la graveco kaj valoro de tiuj ekzamenoj, kaj la rezulto montras pozitivan kreskon de intereso. En 2009 ni havis 126 ekzameniĝintojn kaj en 2010 estis 158 kandidatoj.

IPR: *En kiuj landoj la ekzamenoj estas la plej popularaj?*

KK: Brazilo (51), Francio (35), Germanio (29) kaj Pollando (28).

IPR: *Ĉu tiuj ekzamenoj ne estas konkurenco por la UEA-ILEI-ekzamenoj?*

KK: Ne, ili ĝuste kompletigas unu la alian. La KER-ekzamenoj estas ŝtate agnoskataj kaj mezuras nur lingvajn kapablojn, dum la ILEI-ekzamenoj estas movadaj kaj traktas ankaŭ kulturajn kaj movadajn konojn.

IPR: *Ŝajne ankaŭ en la prezoj montriĝas diferenco.*

KK: La KER-diplomo kaj ĝia agnosko estas ekstermovada, ankaŭ la prezo ne povas resti movada, kvankam ĝi restas sub la merkata nivelo.

IPR: *Ĉu la landaj ekzamencentroj ne ĵaluzas pri ĝi?*

KK: Laŭ niaj spertoj ne, eĉ kelkaj komencas kunlabori, kiel ekzemple la Itala Instituto de Esperanto, kies membroj mem ekzameniĝis kaj komencis ekvivalentigi la nivelojn de la du sistemoj. Danke al komuna seminario ili eklaboris por integri la KER-ekzamenojn en sian sistemon.

IPR: *Kaj kio pri francoj? Ĉu la nova franca ministeria dekreto signifos novajn perspektivojn por la KER-ekzamenoj?*

KK: Teorie jes, povus, sed devas pasi jaroj ĝis oni per efika varbado kaj informado sukcesos diskonigi la fakton, ke ankaŭ Esperanto povos roli kiel egalranga fremda lingvo kaj akceptiĝi por la novaj francaj dungigiĝpostuloj. Tamen neniam eblos superi la hungarajn ciferojn, 5000 ekzamenoj jare estas nekredebla rekordo. Ĉiuokaze jam ekĝermis ideoj kaj ni kunlaboras kun francoj pri kelkaj komunaj projektoj.

IPR: *Kiel oni rilatas al la ekzamenoj ekster Eŭropo?*

KK: Ankaŭ tie estas intereso, la belaj, kvarlingvaj (E-o, angla, germana kaj franca) diplomoj estas allogaĵo por alikontinentanoj. Sufiĉas rigardi la ĉampionon, Brazilon. Sed ni havas pruvon ankaŭ pri tio, ke usona universitato donis kreditojn por nia diplomito. Venis jam kelkaj petoj el Afriko kaj ni esperas, ke ankaŭ en Azio montriĝos pli vigla intereso, ĉar la KER-sistemo pri aliaj lingvoj estas aplikata ankaŭ en pluraj aziaj landoj.

IPR: *Kiel azianoj povus pagi tiujn kotizojn?*

KK: Kvankam la budapeŝta instituto pagigas al UEA por ĉiu kandidato la saman kotizon, ni aplikas kiel bazon la laŭlandan kotiztabelon de UEA. Tiel ni atentis pri la diferencoj



de la vivniveloj, sed tio signifas, ke UEA devas kompletigi la ekzamenkoston de la B-landaj kandidatoj. Ni provas trovi ankaŭ subtenantojn.

IPR: *Ĉu eblas trapasi la ekzamenojn en ĉiuj landoj?*

KK: Teorie jes, sed la ekzamenojn ni organizas tie, kie samtempe antaŭvideblas granda kvanto de kandidatoj; dum UK-oj kaj aliaj internaciaj aranĝoj. Jare estas 5-8 sesioj, kelkfoje paralelaj en du kontinentoj. Iom post iom ni alvenos ĉien, kie estas signifa intereso. Sed ne forgesu, ke pasis nur du jaroj, kaj ni jam havis kandidatojn el 38 landoj, el ĉiuj kontinentoj.

IPR: *Por kiu valoras ekzameniĝi? Kiu bezonas KER-diplomon?*

KK: Unue, bezonas ĝin la komunumo mem, por montri al la ekstera mondo, ke ni estas pli ol simpla hobia movado, ke ni flegas altnivele nian lingvon, kiu estas agnoskita ĉe la *Konsilio de Eŭropo*. Due, instruistoj, studentoj nepre akiru ĝin, ĉar ĝi vere estas oficiala dokumento, utila por labor- kaj studoceloj. Kaj trapasu ĝin ĉiuj, kiuj volas plenumi postenojn en la movado, volas pruvi al siaj mokantaj najbaroj kaj familianoj, ke Esperanto estas vera lingvo!

IPR: *Ĉu vi povas mencii kelkajn gravulojn, kiuj jam trapasis la ekzamenon?*

KK: Principe ni ne faras tion, sed mi petis konsenton de la koncernuloj, do, mi respondu. La unua kandidato estis Ranieri Clerici. Ekzameniĝis ekz. akademianoj F. Lo Jacomo kaj C. Minnaja, el la ILEI-respondeculoj D. Charters kaj M. Grosjean kaj pluraj landaj sekciestroj; niaj artistoj: G. Handzlik kaj M. Bronŝtejn, ESF-estraranoj Mark Fettes kaj G. Goodall, profesoroj kiel F. Pennacchietti kaj N. Minnaja, multaj el la teamo E@I kaj junuloj de TEJO, ankaŭ S. Ó Riain, K. Tytgat, aktvuloj de UEA kiel M. Lipari kaj J. A. Vergara kaj en februaro ekzameniĝos pluraj dungitoj de la Centra Oficejo...

IPR: *Mi estas konvinkita. Sekvaj ebloj?*

KK: La 12an de februaro en Roterdamo, paske en [MIRE](#) en Sète (FR) kaj [PSI](#) (DE), en majo en [Kastelo Grésillon](#), Baugé (FR), en junio dum la [Hispana Kongreso](#) (Madrido) kaj en julio en [TAKE](#) en Brazilo kaj dum UK en Kopenhago, en aŭgusto dum la [Itala Kongreso](#) (Torino) kaj certe aliaj.

Informiĝu pri ĉio ĉe www.edukado.net aŭ ĉe katalin@ikso.net.

Bv. spekti ankaŭ la intervjufilmon pri al KER-sistemo ĉe:

<http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/9867410> .

La artikolo aperis en IPR 2011/1.